

Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet, Kortrijk, Belgio – Jarraporto 2020

La planado antaŭvidis transdonon de la plej granda parto de la kolekto al similaj kolektoj dum la jaro 2020 kaj finon de la likvido dum la jaro 2021. Du neatenditaj okazaĵoj perturbis la planojn. Pro la pandemio nur dum la komencaj kaj lastaj monatoj de la jaro eblis labori en la stokejo kaj ne plu eblis kontaktoj kun eksterlandaj transprenontoj. Krome, la direktorino de la biblioteko petis, pro konstrulaboroj, malpleniĝi la ejon de la Fondaĵo plej laste komence de 2021, multe pli frue ol antaŭvidite.

Disdivido de la kolekto

Je la 16a oktobro ĉirkaŭ 5000 libroj kaj granda kvanto da revuoj estis transportitaj al la Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience en Antwerpen ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Hereda%C4%B5biblioteko_Hendrik_Conscience_\(Antverpeno\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Hereda%C4%B5biblioteko_Hendrik_Conscience_(Antverpeno))). Ili iom post iom estos registratataj en ĝia katalogo. Malpli grandaj kvantoj estis transdonitaj (aŭ estas pretaj por transdono) al la urba arĥivo de Kortrijk kaj al AMSAB kaj KADOC.

La plej granda parto de la restaĵoj estas dumtempe stokita ĉe privata persono. Alia parto (ĉirkaŭ kvin kubaj metroj) estas enpakita kaj atendas transporton al (serĉota) stokejo.

Je la jarfino du aliaj eroj ankoraŭ estis en Kortrijk: la heredaĵkolekto (afiŝoj, flagoj...) katalogita antaŭ kelkaj jaroj (<https://esperantokolekto.alcl.be/>) kun volumeno de ĉirkaŭ unu oficeja ŝranko, kaj la arĥivo (140 skatoloj). La arĥivo ekestis dum pluraj jardekoj kaj estis ordigita laŭ dato de ricevo. Ĝia inventaro iĝis nefidinda. Komence de 2021 finiĝis la laŭtema reordigo. La arĥivo kaj la Esperantokolekto translokiĝu al alia ejo, eble la sidejo de Flandra Esperanto-Ligo (FEL) en Antwerpen, por plua prilaboro (ordigo, inventarado...) prepare al definitiva konservado ĉu ĉe FEL, ĉu en la urba arĥivo de Antwerpen (FelixArchief), ĉu en aliaj lokoj.

Bitigo

La restantaj revuoj de FEL kiuj nur estis disponebla papere (Monato, Horizon-taal, Esperanto-Panorama) estis skanitaj kaj transformitaj en traserĉeblajn pdf-dosierojn. Nun preskaŭ ĉiuj gravaj belgaj Esperanto-revuoj estas rete legeblaj.

Vikiflandrio

Vikiflandrio (<https://wikiflandrio.alcl.be>) estas datumbazo kreita por povi tuj registri historiajn informojn pri Esperanto en Flandrio (kaj najbaraj regionoj) bite kaj laŭteme, prepare al eventuala posta aperigo kiel Wikipedia- aŭ alia artikolo.

La jam delonge anoncita studo pri *Esperanto-kursoj en Flandrio inter la mondmilitoj* finfine aperis (en nederlanda lingvo - <https://www.esperanto.be/fel/akt/vertikale/Vertikale-sep2020.pdf>). Ĝiaj informoj kiel unuaj estis registritaj en Vikiflandrio. Ankaŭ informoj trovitaj dum la reordigo de la arĥivo estis tuj registritaj.

Retpaĝo

La retpaĝo www.esperanto-kortrijk.info (komunua por la Fondaĵo kaj por la loka E-grupo La Konkordo) jam estis malaktuala kaj pro malsukĉesinta transiro al nova programversio iĝis tute neuzebla. Estas la intenco tute refari ĝin por ke la Fondaĵo pluekzistu virtuale.

Internacia Esperanto-Arkivo

La stokado de parto de la Fondaĵo ĉe privata persono ricevis juran bazon per la kreo, komence de 2021, de asocio *Internacia Esperanto-Arkivo* (IEA, <http://www.iespa.eu/>, https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Arkivo), kies celo estas transpreni arĥivajn dokumentojn de asocioj kaj individuoj.

Vikipedio

La Vikipedio-paĝo https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-Fonda%C4%B5o_Cesar_Vanbiervliet estis tute reverkita por adapti ĝin al la nova situacio.

Roland Rotsaert (1.3.2021)